Oni decidis ke la venonta Federacia Kongreso okazos, la 22^o de Majo 1938 (1^o & du semajnojn antaŭ Pentekosto) en LENS, sub la patroneco de la tiea Urbestro.

DIVERSAJ DEMANDOJ.

Dankesprimoj oni decidis sendi al : Radio P.T.T. Nord, al F-ino Andrée kaj S-ro Curnelle, niaj radioparolantoj en Lille, kaj al Esp. grupo en Limoges, kiu sendis al ni saluttelegramon.

PROPONO.

Laŭ la propono de Dunkerque-a grupo, la kunvenataro aprobas la donacon de 300 frankoj al nia bulteno *Nordfranca Esp.*

La prezidanto aldonas : « Ni petas la gvidantojn de tiu gazeto akcepti tiun « modestan donacon kiel elmontron de « nia dankemo pro la bonega laboro. « Cetero, se estas inter vi malvaraj me- « cenaloj, mi konsilas al ili monsubteni « nian gazeton. Ili povas esti certaj ke « neniam mono estus plibone uzata. »

S-ro Petit, sekretario de S.F.P.E., invitas ĉiujn gefederaciojn tuj aliĝi al Internacia Konferenco en Parizo kaj legas ĝian detalan tre allogan programon.

Fine, S-ro Humez dankas la ĉeestantojn pro ilia atento kaj fermas la kunsidon, dezirante al ĉiuj agrablan tagon.



COMITÉ DE LA FÉDÉRATION

Présidents d'honneur : MM. F. DURIEUX (décédé), J. VANVAERTS, E. DELIGNY.

Vice-présidente d'honneur : Mlle BARRET.

Président : Albéric HUMEZ.

Vice-présidents : Mlle A. COLLÉATTE, MM. P. BENOIT, G. DEGAND.

Secrétaire général : J. CENTNERSVER.

Secrétaires pour :

- a) radio..... Maurice NOGÉ.
- b) presse..... E. HOUZÉ.
- c) exposition..... M. VOLQUEMAN.
- d) bibliothèque... J. CENTNERSVER.
- e) instituteurs... A. DUMARQUEZ
- f) isolés..... P. BRUNET.

Trésorier : Ch. WARUSFEL.

(Chèques Postaux : Fédération Espérantiste du Nord : Lille 517-15).



Résultats du Concours « Fervorigilo » 1937

Le Groupe de PONT-SUR-SAMBRE gagne la Coupe pour la deuxième fois.

Classement individuel :

1^{er} Prix (25 fr. de livres) : M. Faucher Fernand, de Pont-sur-Sambre.

2^e Prix (15 fr. de livres) : M^{lle} Andrzejewski Justine, Amiens.

3^e Prix (10 fr. de livres) : M. Blanchet Gilbert, d'Avesnes.

4^e Prix (10 fr. de livres) : M. Erjauec Raphael, de Lens.

Les épreuves ont été corrigées par M. E. Deligny, président d'honneur de la Fédération, membre du « Lingva Komitato », puis

revues par M. le Docteur P. Desmoulin, président du Groupe de Douai.

Remarques des correcteurs :

1° Pour la Coupe, le Groupe de Pont-sur-Sambre l'emporte de fort peu sur celui d'Amiens ;

2° Pour les prix individuels, l'écart est infime entre les copies de M. Fauchez et de M^{lle} Andrzejewski, d'une part ; entre les copies de MM. Blanchet et Krjavec, d'autre part.

En conséquence, un quatrième prix a été ajouté, à titre exceptionnel, cette année.

Les gagnants des prix individuels achèteront eux-mêmes les livres d'ESPERANTO à leur convenance ; ils n'auront qu'à en adresser la facture acquittée au trésorier fédéral (M. Ch. Warusfel, Directeur des Entrepôts Généraux, à Douai Nord) pour en être remboursés, à concurrence du montant des prix gagnés.

Le président de la Fédération du Nord adresse ses vives félicitations au groupe de Pont-sur-Sambre, ainsi qu'aux autres lauréats du Concours.

La Coupe sera disputée à nouveau au cours du Congrès fédéral de Lens, en 1938.

Albérie HUMEZ.

MEDITINDAĴO

EĤO de la AMIENS'A KONGRESO

Tiu signifoplena babilado okazis en la Kongresa dimanĉo, la 2^{an} de majo 1937, dum la vojiro de la monumento Jules Verne ĝis la urbodomo.

Juna fervorulo el... (pri la loko mi silentos) plendis al geamiens'anoj, ke en sia urba grupo — krom kelkaj « kiel vi fartas » aŭ « bonan vesperon » — oni, inter esperantistoj, neniam uzas la lingvon Esperanto.

Tiam la Amiens'anoj konsoliĝis pri tio, ke en ilia tamen granda urbo, grupanoj nur same multaj kiel la lingvoj de mano kapablas flue kaj internacie uzi, pri kiu ajn temo, la internacian lingvon.

Ja certe, nia juna fervorulo pravas. Tro ĝenerala estas tiu konstato de neuzo de esperanto inter esperantistoj.

Por grupo, NE SUFICAS organizi kursojn, kiuj ĉiujare « naskas »

centon da novaj bonintencantaj esperantistoj ; NE SUFICAS disdoni pli malpli da diplomoj ; NE SUFICAS starigi praktikajn kunvenojn, se oni ne efektive praktikas kaj konstante progresas. Ankaŭ oni memoru, ke pro ĝia granda facileco, Esperanto estas ofte tro NACIE uzata (t.e. tro laŭvorte). Do, eĉ praktikaj kunvenoj NE SUFICAS se la esperantistoj ne POSTULAS de « klasika » klera samideano severan korektadon por akiri ĝustan vortuzon kaj plej internaciajn esprimturnojn. Esperanto valoras nur pro la lingva unueco.

Ankoraŭ alian plendon de nia fervorulo, rememorigas al mi tiuj lastaj vortoj, pro tio, ke dum la ekzameno, oni demandis lin pri kelkaj ne oficialaj radikoj, kiujn, kompreneble li ne lernis. Ĉu do la oficialigitaj radikoj ne estas kontentigaj por la « Supera Atesto pri Lernado ? ». Tiukaze, oni povas diri, ke SUFICAS uzi korekte kaj internacie la oficialajn radikojn por esti nomata « bona esperantisto ».

Laŭ aŭtentika konversacio
aŭdita de Kongresano.

Êtes-vous encore en possession du Programme numéroté de la Séance récréative d'Amiens ?

Voici la liste des numéros gagnants de la tombola tirée à l'issue de cette séance :

5	22	30	32	35	38	42	57	60	70
76	79	86	88	93	110	113	134	136	140
141	145	148	156	160	162	167	170	171	175
186	201	202	211	214	216	221	224	233	236
239	252	262	272	280	298	318	327	330	332
335	339	345	366	367	369	378	390	391	398
443	460	485	488	495	505	515	524	529	542
552	591	627	651	653	656	666	671	672	676
677	690	701	718	724	731	736	744	748	749
771	785	787							

Réclamer les lots chez Mlle A. Colléatte, 17, rue Le Mongnier, jusqu'au 10 juillet.

★

GRAVA PETO.

F-ino A. Colléatte estos dankema al kiu sendos al ŝi fotografajon de la Kongresanoj, antaŭ la monumento al Jules Verne.

Vivo de la Grupoj (lasthore)

DUNKERQUE. — La 5^{an} de junio, antaŭ 200 ĉeestantoj, en la salono de la urbodomo, Filipo Lidia Zamenhof arte paroladis pri Polujo, traduko frazo post frazo ne ĝenis. La urbestro elokvente esprimis la kontenton kaj dankon de ĉiuj.

— La 6^{an} de junio, antaŭ pli ol 60 s-anoj, Filipo Zamenhof emociige prelegis pri sia patro ; sekvis deklamo de poemo al la majstro de bulgara s-ano N. Babaskerof kaj saluto de S-ro Binham, el Londono ; ĝenerala fotografado kaj oficiala akcepto de la urbestro kiu solene donacis al F-ino Zamenhof la honormedalon de la urbo.

— La 19^{an}, prelego de S-ro Binham pri Londono kaj impresoj de vojaĝo en Nord-Francoj.

— La 22^{an}, en "Eole", prelego de S-ro Roland Dupuis, pri "Chopin" kaj gaja vespero organizita de li.

— Dimanche 4^{an} de julio, eskurso per aŭtoĉaro al Osdunderque, Bruges kaj Ostende.

— Merkrede 7^{an} de julio, je la 7^a, en la urbodomo, kunveno de la grupo.

— La grande fête espérantiste du groupe est reportée au samedi 31 juillet au lieu du 24.

Ni funebras...

Por la ĉi sekvanta letero, nia Honor-prezidanto, S-ro Deligny, sciigis al ni pri la morto de S-ro DURIEUX :

« Mi havas la doloron sciigi al vi, ke nia « Karmemora Honor-Prezidanto, S-ro Durieux, mortis en Cusset la 31^{an} de majo, post longa malsano. Mi ne bezonas rememorigi la gravan rolon luditan en nia regiono de nia amiko, kiu, senlace kaj kun neimagebla kuraĝo, propagandis nian lingvon en malfacila epoko. Cetere, en la tria numero de Nordfranca Esperantisto, vi povis legi artikolon pri liaj meritoj. — E. DELIGNY.

Post la morto de Michaux, jen ankoraŭ kruela bato de la sorto, kiu forprenas de ni unu el la plej kuriozaj kaj simpatiaj figuroj de nia antaŭmilita movado.

Estas S-ro Durieux kiu faris en nia regiono, dum la heroa epoko de nia movado, la unuan provon por racie instrui Esperanton en la lernejoj.

Je la nomo de niaj legantoj kaj de la norda esperantistaro, Nordfranca Esperantisto estas la familion de S-ro Durieux akcepti siajn sincerajn kaj simpatiajn kondolencojn.

La Internacia Konferenco de Paris

Dum Pentekosto, en tre bela kaj taŭga domo de Parizo konvenis, el pli ol 20 landoj, ĉirkaŭ 700 gesamideanoj.

Dividitaj en 4 sekcioj, ili atente ekzamenis la rezultojn jam akiritajn de esperanto en diversaj landoj rilate al ĉiu elemento de

la moderna vivo ; kaj ili kuraĝe diskutis rezoluciojn sendotajn al la oficialaj instancoj kun propono de praktikaj rimedoj por akceli la enkondukon de la helplingvo en ĉiu faktoro de la homa aktiveco.

Apud tiu serioza laboro meritplene plenumita, citindaj estas la tre sukcesa teatro-prezentado, la kvin sciencaj kaj artaj prelegoj interesege, kaj la solena malferma kunveno en « Champs Elysées » vere impona kun tre favora parolado de S-ro Jullien, vic-ministro por Teknika Instruado.

Entute bonege organizita Konferenco kiu donas kuraĝigan impreson kaj novajn spertojn, novajn esperojn. — E. H.

La sano de nia bubeto

Nun Nordfranca Esperantisto grandigas kaj marŝas preskaŭ tutsola, kvankam ni devas ankoraŭ konstante prizorgi lin... Akcidento aŭ malagrablaĵo tiel rapide okazas...

Kelkaj amikoj pripensis ke estas tempo donaci kelkajn ludilojn al la juna bubo Nordfranca Esperantisto por ke li povu amuziĝi. La baptopatrino de nia bulteno sendis la « Paskon » de sia baptofilo, « Verda Kato » Verdano Katon kaj « Sukera Onklo » kiujn ni renkontis dum la Amiens'a Kongreso, metis en nian poŝon... paketon. Ankaŭ la Norda federacio sendis al ni... ĉekon.

Kiel vi povas vidi, oni ne tute forgesas la « junulon » Por li, ni dankas plej varme niajn geamikojn. Ili subtenas fervore kaj malavare nian modestan revuon kaj nin kuraĝigas labori ankoraŭ pli energie por nia movado.

KONSTANTA SUBTENO

DUA LISTO :

La baptopatrino de Nf. E.....	50 fr.
" Verda Kato ".....	20
" Sukera Onklo " (B..., el Poix de la Somme).....	30
La juna Grupo de Avesnes.....	5
Entute.....	105



Redakcia Leterĥesto

Ni ricevis lastatempe multnombrajn leterojn : gratulajn, kritikajn, kuraĝigajn, k.t.p. Bedaŭrinde ne estas eble al ni respondi al ĉiuj.

Al S-ro Fred Wharff, en Los-Anĝeles. — Dankon pro viaj sendaĵoj. La nericevitajn bultenojn ni sendis al vi.

Al S-ro E. D., en O. — Mi gratulas al vi. Mi skribos aparte.

Al F-ino S. M., en D. — Jes, vi pravas kaj mi dankas vin.

Al Ge-V. — Certe mi ĉeestos. Ĝis ja...

Someraj Esperanto-Lernejoj

Kaj vi, kara samideano (ino), kie vi pasigos vian libertempon? Ĉu en Nederlando? Ĉu vi vizitos la Esperanto-Domon en Arnĥemo? Unikajn tagojn vi povas pasigi tie inter plej diversnaciaj geamikoj en agrabla rondo. Kion ĉijare la Internacia Cseh-Instituto aranĝas! Tro por ĉion citi: Kurso por komencantoj, 12-17 julio; kurso pri la Esp. Literaturo, 19-21 julio. Plie rondvojaĝo; Libertempado de Esp.-gejunuloj; Jubilea semajno; Internacia perfekta kurso kaj fine Seminario por Cseh-metodaj instruistoj. Petu informojn al Esperanto-Domo, Arnĥemo (Nederlando).

★

Sed eble vi havas alian planon. Ĉu al Malo-les-Bains vi iros? Verdire, kial ne al Malo? Konate jam estas, ke ankaŭ tie ĉijare okazas kunvenoj de diversnaciaj geesperantistoj. Pasigi semajnon apud la Norda Maro, en la bona hotelo « Eole », kie ĉiu sin sentas hejmece; fari belajn ekskursojn kaj fine ne nur amuziĝi sed ankaŭ pli bone lerni nian lingvon en agrablaj konversacioj... Nu, vi scias jam, sinjoro Henk Thien gvidos via tra eventualaj labirintoj de nia Esperanto-gramatiko. Skribu al: Esperanto, Dunkerque (Nord).

★

Ĉu vi jam estis en Malo? Vi ŝatus ĉijare iri allokten? Feliĉaj estas ni esperantistoj. Kien ajn ni vojaĝas ni trovas libertempojn. Longa jam estas la listo. En *Heroldo* mi ĵus legis: « Vizitu la Internaciajn Ferialajn Esperanto-Kursojn en Helsinor, Danlando, 31 julio-7 aŭgusto. Perfekta kurso; prepara kurso, k. t. p. — 7-14 aŭg. prelegoj; Prepara kurso por Cseh-metodaj geinstruistoj. Gvidos F. Ivo Saxl. » Ne necese rekomendi la aranĝojn de la Dana Esp.-Instituto. Vi estos surprizita pri la malalta kotizo por loĝado kaj kurskotizo. Detalan prospekton sendos al vi: L. Friis, Thyrasvej 15, Aabyhoj (Danlando).

★

Kaj plie...? Vi povas iri al Silkeborg, la koro de Danlando. Same, malmultekosta restadejo. Interesaj 10 tagaj kursoj. Petu detalan programon: Stig B. Skole, Lernejestro de « Kornmod », Silkeborg (Danlando).

★

Suno, maro, aero... ĉe Pblua Adriatiko en via hotelo! Postulu esperantan prospekton. Esperantistoj ĝuas rabaton. Hotelo Esperanto, Selce, apud Crikvenica (Jugoslavio).

★

Povas esti, ke mi vane konsillis. Vi tute simple ne intencas viziti unu el la aluditaj lokoj. Nu? Sendube vi iros al Parizo. Al la Ekspozicio, kiu estos preta dum via libertempo. Kaj tie vi deziras vere libertempojn kaj tute ne okupiĝis pri Eper., ĉu? Sed ve.. Kiom da verdaj steletoj tiklos vian atenton. Ĉar multaj esperantistoj atakos ĉijare la koron de Francujo. De ĉiuj flankoj ili venos.

Ankaŭ el la ĉarma urbeto Poissy, kiu troviĝas je 24 km de Parizo. Sed tiun lokon vi konas tre certe, kaj verŝajne vi jam aŭdis, ke ankaŭ tie okazos someraj kursoj por geinstruistoj. Jes, jes, feliĉe la "verda mikrobo" infektis jam tiom da koroj, ke baldaŭ ĉiupaŝe ni vidos nur steletojn.

Do, se vi iros al Poissy, skribu tuj al S-ro H. Micard, Epineux-le-Seguain, par Meslay-du-Maine (Mayenne). Li donos al vi ĉiujn informojn pri la kursarangoj, ebleco loĝi en komforta hotelo aŭ sub tendo. Belega arbaro troviĝas ĉirkaŭe. La rivero Seine estas preta ĉiutage akcepti banemulojn. Kompreneble la verdaj kavaliroj rajdas de temp' al tempo al Parizo por viziti la Ekspozicion. Kial vi ne iros tien? Aŭ ĉu tamen? Gis la revido! — S.

Korespondado

Deziras korespondi kun francoj:

50 gekursanoj el Ĉekoslovakujo. Skribu al la instruisto: Max ULTMANN, Namesti I, BOSKOVICE (Ĉ. S. R.).

20 Grekaj. Sendu leteron aŭ p. k. al la prezidanto: D-ro Anakreon STAMATIADIS, esperanto, Str. Rodov 21, ATENO (Grekujo).

10 Rusoj. Skribu al: Viktor PETIGEN, Ĥrovostina 44-7, ODESSO (U.S.S.R.).

ankaŭ: TOM, A. SEEL, 102, Lottridge Street, HAMILTON — ONTARIO (Canada).

ANNONCES

A VENDRE AUTOMOBILE, C-6, cabriolet Citroen, 6 cylindres, 4 places et spider, très bon état, 46.000 kilomètres. 6.500 francs. — Ecrire à la Rédaction.

Pendant votre séjour à Paris, prenez vos repas au RESTAURANT GIROUX, 1, rue du Dragon (6^e), à proximité des stations métro: Croix-Rouge et Saint-Germain. Maison recommandée.

Dans la Presse française

De L'ECLAIREUR DE NICE:

AU SERVICE DES NATIONS

Sous ce titre, nous lisons dans le « Moniteur du Puy-de-Dôme » l'excellent entrelien suivant:

Dans un article de la « Revue Hebdomadaire », M. P. de La Roche s'exprime ainsi:

« Pour nous, le tourisme n'est pas qu'une affaire de gros sous. Pour nous, le tourisme a aussi une valeur, en quelque sorte spirituelle. Si nous souhaitons de voir le flot des visiteurs étrangers refluer vers la France, c'est que jamais les peuples n'ont eu plus besoin de se connaître, de s'apprécier mutuellement. Le tourisme ne doit pas être à sens unique. De ces contacts répétés, de ces « malaxages », de ces échanges, la paix de l'Europe doit sortir consolidée, affermie. Les malentendus entre les peuples avec les destins tragiques qui en sont l'aboutissement fatal ne pourront-ils un jour céder la place à une estime réciproque, ouvrir le chemin à une collaboration organisée? Nous osons l'espérer. Le tourisme est un agent national de prestige, de publicité. »

Ce sont là des idées universellement admises, mais quelle efficacité l'emploi de l'esperanto ne donnerait-il pas à ces « échanges » touristiques? La langue auxiliaire n'est-elle pas l'instrument indispensable du tourisme, qui permettra aux peuples de « se connaître » et de s'apprécier mutuellement? Que l'on compare l'impression produite par les phrases toutes faites et les boniments des guides et interprètes avec celle produite par des conversations directes en une langue universellement parlée, qui permettront à l'étranger de pénétrer profondément dans la vie et les mœurs des pays qu'il visite. La conclusion qui s'impose est qu'il n'y aura jamais de pénétration spirituelle réciproque entre les peuples tant que les nations n'auront pas adopté une langue internationale auxiliaire. Et quelle langue pourraient-elles adopter, sinon l'esperanto, dont la valeur s'affirme chaque jour plus nettement et dont la diffusion actuelle permet de constater qu'elle est bien une langue universelle?

Du NORD MARITIME:

CONGRES UNIVERSEL

Le XXIX^e Congrès universel de l'esperanto aura lieu cette année, à Varsovie, du 1^{er} au 7 août. Ce sera un congrès jubilaire: il y a, en effet, cinquante ans que le docteur L.-L. Zamenhof publia sa première brochure sur la langue auxiliaire. Cette brochure parut sous la signature « Docteur Esperanto »; ce pseudonyme, qui veut dire « celui qui espère », devint par la suite le nom de la langue.

Notons que le Président de la République polonaise, M. Moscicki, a accordé au congrès son haut patronage.

Du PROGRES DE LA SOMME:

RADIO-CLUB ESPERANTISTE DE FRANCE

L'Assemblée générale de 1937 a eu lieu sous la présidence de M. René Mesny, assisté de M. Henri Favrel, secrétaire général. Le rapport moral et administratif a fait ressortir l'inscription du 1425^e membre et du 869^e aux cours par correspondance.

Le Radio-Club a 49 délégués dans 37 départements, 4 dans les colonies et 3 à l'étranger. La revue trimestrielle « Radio-Esperanto » est appréciée non seulement en France, mais à l'étranger. La revue mensuelle « Internacia S.O.S. Bulletin » paraît régulièrement et tient ses lecteurs au courant de tous les programmes des émissions radio-esperantistes.

Il est signalé la fondation de deux autres Radio-Clubs esperantistes, l'un en République Argentine, l'autre en Belgique; ces associations vont être unies avec la nôtre en Fédération internationale des Associations radio-esperantistes, en attendant la création de nouvelles.

Actuellement, 13 stations françaises diffusent de l'esperanto et environ 25 à 30 stations étrangères; le mouvement est donc en progrès satisfaisant.

Il est fait un nouvel appel aux amateurs-émetteurs qui savent l'esperanto, pour qu'ils se fassent connaître et adhèrent à notre réseau international des stations d'amateurs sur ondes courtes.

La situation financière du R.C.E.P. est toujours satisfaisante.

Le Comité pour 1937 est composé de: président, René Mesny; vice-présidents, André Baudet et Marcel Dupois; secrétaire général trésorier, Henri Favrel; secrétaires adjoints, Mme E. Thiriel et Raymond Barbe; membres, Michel Alglave, Robert Delattre, Emile Ferrari, Charles Marseille, Constantin Naoumoff, Jean Pain, Mme L. Daurge.

Le Radio-Club, fondé le 16 décembre 1926, vient donc d'avoir dix ans d'existence; il se propose de fêter dignement cet anniversaire.

Pour tous renseignements, inscriptions, cours, s'adresser à Henri Favrel, ingénieur, secrétaire général, 26, avenue Dode-de-la-Brumerie, Paris (16^e).

LÉGION D'HONNEUR


Nous avons eu le plaisir de relever dans le « Journal Officiel » du 16 mai, l'inscription au tableau de concours pour la Légion d'honneur, de M. Albéric Humez, capitaine de réserve au Service de Santé, président de la Fédération esperantiste du Nord de la France.

Nos plus sincères félicitations.

POUR APPRENDRE L'ESPERANTO

L'étude de l'esperanto est très facile par correspondance et peu coûteuse. Tous renseignements sont donnés par « Esperanto, à Dunkerque ». Joindre timbre pour réponse.

Nia Konkurso



Sekve de nia konkurso pri alskribajo metota sub la desegno de nia amiko Birembaux, ni ricevis 22 proponojn. Inter ili, ni rimarkis la sekvantajn :

1. de S-ro Cavier :

Nokte rigardu la Ĉielon ! Verda Stelo brilas en ĝi kaj kvazaŭdiras « Amon kaj Pacon ». Ĝi estas la animo de Esperanto.

2. de S-ro Broulin :

(La astronomo). « Tiel videbla kaj bela... kaj tamen la homoj ne ĝin vidas. Ĉu ili estas blinduloj ?... Post kelkaj monatoj de lernado oni akiras senpage la necesan vidilon.

3. de S-ro M. Nogé :

« Simbola gesto
Farenda de ĉiu naciestro
Por trovi la vojon
Al interhoma alproksimiĝo. »

4. de Verda Nazo :

Luma Ĉielo,
Verda Stelo.
Astronomo :
Frenezanto,
Astro-nomo ?
Esperanto !

5. de S-ro Tremon :

« Pas besoin de vos tubes, mages orientaux,
Pour voir venir le règne de l'Esperanto. »

6. de S-ro Jak Cent :

Dum nokto plenluma
En ĉielo stel-luna
Ekvidis klera astronomo
Steleton similan al verda brilanto
« Kio estu de tiu astro, nomo ? »
Demandas la Ĉiel-esploranto.
Kaj per radia ondo
Venas tuj respondo
« Ĝia nomo estu : Esperanto ».

7. de S-ro Johano Ravettlat (Hispanujo) :

En la ĉiela arkajo brilas verda stelo por la interkompreniĝo de la homaro.

Ni tutkore dankas al la konkursoj kiuj sendis al ni proponatajn alskribajojn.

Inter la supraj publikigitaj tekstoj, nia presisto elektos kaj sendos la premion al la gajnanto kies nomon ni sciigos sur venonta numero.

De S-ro Nogé, ni ricevis la jenan leteron :

« Kvankam farante tiun konkurson « mi tute ne celas gajni premion, sed « nur vin danki samkiel viajn kunlaborantojn por ĉio, kion vi faras « por igi nian gazeton pli kaj pli « interesa kaj leginda. »

Verda Nazo ankaŭ ne deziras ricevi la premion.

Do ĝi estos aljuĝita al unu el la kvin restantaj konkursantoj.

Compétition-Exposition Internationale de Photographies d'Amateurs de Calais

Nous avons le plaisir de rappeler à nos abonnés que "L'Activité Intellectuelle du Calais" organise une Compétition du 15 Janvier au 15 Septembre 1937, exclusivement réservée aux amateurs photographes français et étrangers. Cette compétition sera suivie d'une grande Exposition en octobre 1937, à Calais.

Des prix spéciaux seront décernés aux exposants espérantistes.

Demandez règlement à M. G. Masson, président, 96, rue Hermant, Calais.

PENSO

Mi eble ne konsentas kun tio, kion vi diras, sed mi defendos ĝis la morto vian rajton tion diri. — VOLTAIRE.



La tasko prizorgi gazeton ne ĉiam estas ripoza kaj tiel facila kiel oni ĝenerale povus kredi aŭ supozi ! Tamen apud malagrablajoj, akraj kritikoj, eĉ « buŝgatoj » kiujn ni ricevas plejparte perletere, ni kelkfoje ricevas ankaŭ ridindajn proponojn tre amuzajn kaj kiuj bone montras al ni ke ĉiam homoj (mi intence ne skribas « viroj ! ») estas kaj restos, eble eterne, grandaj infanoj...

Nun jen estas specimeno de tio, kion ni, de tempo al tempo, ricevas. Mi kompreneble ne povas certigi al vi ke la sistemo estas patentigita (kiel por la frizondumo !) sed verŝajne la tro inteligenta fripono kredis ke estas tempo skui la pirarbojn kaj fari bonan rikolton da tute maturaj piroj. Jen la afero :

« SINJORO,

« Komerca Societo estas nun starigita por ekspluatado de peltajoj, kiu donos al viaj membroj nekalkuleblajn profitojn.

« Ni ne dubas ke ĉi-tiu propono tre interese vin kaj ni vin petas bonvola sciigi nin, kiel eble plej rapide, la sumon kiu vi intencas alporti en la novan Societon.

« La celo de nia Societo estas instali en Afriko, sur vastega bieno, grandan farmodomon por bredi katojn, la necesa bieno estos aĉetebla je tre favoraj kondiĉoj.

« Por komenci, nia Societo aĉetos unu milionon da katoj. Ĉiu kato naskos po 12 katidoj por unu idarnesto. La peltoj valoros por unu : la blankaj 0 frk., 50 kaj la bele nigraj 3 frk., 50. Tio donos 12 milionoj da peltoj ĉiujare kaj je la meza prezo de 1 frk., 50 tio donos al ni ĉiutagan grandan profiton de 50.000 frk.

« Ĉar unu laboristo povas potaĝe senbrutiĝi 300 katojn po salajro de 10 frk., oni uzos 100 laboristojn ĉiutage en la farmodomo kaj certe restos al ni neta profito de 49.000 frk.

« La katoj estas nutritaj per ratoj. Oni aranĝos en la ĉirkaŭaĵoj farmodomon por la ratoj. Estas de ĉiuj konata fakto ke la ratoj plimultiĝas 4 foje pli rapide ol la katoj. Do, se ni komencas kun unu miliono da ratoj, ĉiu kato havos potaĝe 4 ratojn kaj tio estas tre sufiĉa. Nun, ni nutras la ratojn per la kadavroj de la katoj post elpelligo de ili, kompreneble. Tiu farmaniero donos al ĉiu rato, kiel manĝaĵon, kvaronon da kato.

« Oni tuj bone ekvidas ke la afero sufiĉas

al si mem, aŭtomate, de la komenco ĝis la fino. La katoj manĝos la ratojn, la ratoj manĝos la katojn kaj ni havos la felojn !

« Atendante de vi tre baldaŭan respondon kaj esperante ke vi tute ĝuste taskos la neatenditan ŝancon kiu ni oferas al vi kaj kiu permesos al vi akiri grandajn riĉaĵojn, ni estas, tre estimata sinjoroj, k. t. p. »

Subskribita : STAV. ISKIO.

Se kelkaj el niaj legantoj estas interesataj de la supra propono, mi estas tute preti sendi la adreson kaj dokumentaron al la petanto, pri tiu mirinda afero.

VERDA NAZO.

■

INFANAĴO

(Historieto sendita de S-ro H. L., fervora samideano el Tourcoing.)

Ci-tiu simpla rakonto havas almenaŭ unu bonflankon : ĝi estas travivaĵo.

Estis vendredo. Pro religiaj sentoj, oni manĝis fiŝojn. Posttagmeze, patrino pensis pri la najbaraj katoj kaj portis la kapojn kaj restaĵojn de fiŝoj en la ĝardenon.

Peĉjo, kvarjarulo, fininte sian manĝon, petis permeson kuri en la ĝardenon. Oni tion permesis tuj, kondiĉe ke lia avo zorgu pri li. Subite la knabeto ekvidas katon tre okupatan ĉe la fiŝrestaĵoj. Peĉjo alproksimiĝas malrapide, sed la kato forkuras kaj saltas sur malproksiman harilon.

Peĉjo alparolas ĝin : « Venu, kato !... venu kaĉjo... ». Sed la kato ne venas.

Tiam, avo diras al la infano : « Sed Peĉjo mia, vi ja scias ke la besto ne komprenas ! »

— Jes, ja ! avo, rediras Peĉjo large malfermante siajn okuletojn, ĝi komprenas, ĉar ĝi havas orelojn !

■

SUR LA STRATO

Sinjoro alparolas aŭtomobilan konduktoron :

— Kiom da mono postulas vi por veturigi min al la stacidomo ?

Konduktoro : Kvin frankojn.

Sinjoro : Kaj por miaj pakaĵoj ?

Konduktoro : Ho ! Por pakaĵoj mi neniom pugigos al vi.

Sinjoro : Tre bone ! Tiam transportu miajn pakaĵojn al la stacidomo ; mi, iros piede.

■

HEJME

Infano : Kial, patro, la fiŝoj estas mutaj ?

Patro : Ĉar, infano mia, se ili parolus, akvo enirus en ilia buŝo.

D I S T R A J O J

1. SORĈ-ENIGMO (de S-ro Georg HOLICZER)

El postlasajo kreu ĉefpersonon.....
El poemero formu helpodomon....
El lumigil' dezertan arbon faru....
Kaj karakteron el bezon' preparu.
Fiŝistan ilon el planed' nodligu....
El akvamas' birdegon sorĉ-estigu.
Legomon el bakaj' faritan manĝu.
Feliĉtentilon je teksajo ŝanĝu.....
Markonkon sorĉu el la vivdestino

Komencliterojn legu en la fino x x x x x x x x x x

Tiu SORĈ-ENIGMO konsistas el trovi 18 vortojn kies signifojn donas la versoj.
La vortoj de la dua vico estas farataj per la literoj de tiuj de la unua vico.

Ekzemple : la unua verso donas signifojn de du vortojn : 1^o postlasajo ; 2^o ĉefpersono.
La komencliteroj de la dua vico donas interesan vorton. — Kaj nun : Bonan Kurajo.

*Tiu-ĉi monaton kaj la venontan, ni publikigos nur unu problemon.
Sed atentu! tiu problemo tamen valoros po 40 poentojn.*

Sendu solvojn aŭ komunikajojn pri tiuj « Distrājaj » ĜIS LA 31^a DE JULIO 1938.
nur al nia kunlaboranto : S-ro Gaston DAMMEBEY, en BORRE, par Hazebrouck (Nord).

SOLVOJ de la Aprilaj Konkursoj :

1. ENIGMO

doni — aglo — nevo — kara — arbo —
luno — esti — sola — pano — erco — rato
— aero — nabo — tero — oleo — ĉiam —
ideo — enui — osto — naĝi — iloj — havi
— arko — vivo — apro — sono — gaso —
edzo — alia — maro — inko — kolo —
opio — juna — nulo.

2. LA LERTA ĜARDENISTO

estas esperantisto, ĉar li devas planti la dek
arbojn laŭ figuro de nia kvinpinta stelo.

SOLVINTOJ :

Ricevis 40 poentojn : S-ro Cavier, s-ino Lothé-Faleur, s-ro Trémon, s-ro Cappelaere, f-ino Kerskaw, s-ro Caubel, s-ro Albéric Humez, s-ro Prince, s-ino Irlande, s-ro Jonequiert, s-ro Bernard, s-ro Brunet, s-ino Baronfosse, s-ino Delavigne. — *Ricevis 39 poentojn* : f-ino Coquelet, s-ino Ch. Victor, f-ino Andrejenski, s-ro Henry, s-ro Georg Holiczer (el Wien-Aŭstrio). — *Ricevis 38 poentojn* : f-ino Colléatte. — *36 poentojn* : f-ino Triquet, f-ino Duflos. — *20 poentojn* : Anonimulo.

Solvinto de Marto. — *Ricevis 20 poentojn* : S-ro Cavier.

Pro manko de loko ni publikigas nur la nomojn de la 20 unuaj konkursantoj kaj iliajn poentojn.

DAŬRA KONKURSO

s-ro Brunet, en Arras	237
s-ro Trémon, en Caudry	236
s-ro Cappelaere, en Malo	236
s-ino Irlande, en Poix	234
f-ino Colléatte, en Amiens	233
f-ino Andrejenski, en Amiens	233
f-ino Coquelet, en Jeumont	221
s-ino Lothé Faleur, en La Capelle ...	215
s-ro Cavier, en Hautmont	215
s-ra Vergez, en Boulogne-sur-Mer...	194
s-ro Bernard, en Liévin	193
s-ro Jonequiert, en Arras	180
f-ino Triquet, en Rosendael	171
f-ino Cípera, en Pilsen	142
s-ro Haudréchy, en Longpré	140
s-ro Henry, en Marpent	135
s-ro Albéric Humez, en Douai	119
s-ino Victor, en Amiens	117
f-ino Duflos, en Malo	116
f-ino Dejuine, en Amiens	113

Tiun-ĉi monaton, S-roj BRUNET, en Arras, kaj TRÉMON, en Caudry, gajnas premion.

Atentu! Kelkaj partoprenintoj ne sendis solvojn dufoje sinsekve : mi rememorigas al ili ke se ili ne sendos solvon tiun-ĉi monaton, iliaj poentoj ne plu valoros.

Hôtel recommandé :

HOTEL DE FRANCE

Rue de l'Hôtel-de-Ville, ABBEVILLE

DINOARD. Propriétaire - Téléph. 42

RADIO-APARATO "RENOVOX"



Preciza reguligo
Bela aspekto
ALTRVALITA MATERIALO
6 lampoj
CIAJ ONDOJ
Variebla Selekteco
Amerikaj lampoj
Mezgrandaj frekvencoj
(kun fero)
365 kilocikloj

Antaŭ-selektigilo efika
Diverskolora ciferplato
7 kaj 14 kilocikloj po komutatoro
Luma akord-indikilo
Duobla toneco - Elektro-dinamo
Grandmodela laŭtparolilo, haviganta
nekompareblan muzikecon, kiu igas tiun
modelon vera radio-aparato de muzikamantoj

PREZO : 2.035 FR.

10 %-a rabato por Nf.E-abonantoj

Anciens Etablissements

Lavoix & Renouard

49ter, Rue d'Arras -- DOUAI

ESPERANTO - ĈAMPANO

Grand 1^{re} cru — Unna Vinberregiono

Klasigita en 100 % kategorio

Laŭ gustoj : Dolĉa ; Duondolĉa ; Maldolĉa

Prezoj en Reims :

Carte verte (verda kapuĉo) po botelo . 10. fr. fk

Mendu al samideano

R. CHANCE, 3, rue René-Bourgeois, REIMS (Francoj),

Pago al R. Chance, Mailly-Champagne (Maro)

Poŝtĉek-konto : Nancy 334-72

M. MAX TAILLEUR

16, Rue Gambetta

LENS (P.-de-C.)

Téléphone 603

Méthodes et Dictionnaires Esperanto

Librairie BRUNET

32, RUE GAMBETTA, ARRAS

Téléphone 81 — Ch. Ps : Paris 177-87

Liste de Livres sur demande, contre un timbre de 0 fr. 50

EXPORT

BRAUNIA

Buvez les bonnes Bières
de la Brasserie CARLIER

11, rue Félix-Faure, COUDEKERQUE-BRANCHE

B. C. 909 — Tél. 570 Dunkerque

Elles sont livrées partout et chez tous
en fûts et en bouteilles

BOCK LUXE

BOCK IDEAL

Hôtel-Pension "EOLE"

Madame PESSEY

158, 159, 160, Digue de Mer

MALO-LES-BAINS (Nord)

Téléphone 13.25

Vue magnifique sur la mer

TOUT CONFORT — PRIX MODÉRÉS

Reduction 5% aux Espérantistes
Esperanto parolata

De la mi-juillet au 31 août, séjour à l'hôtel
du professeur hollandais THIEN

PORTO VASMONTÉ

H. DE VASCONCELLOS, O. PORTO

Agent général : C. DOLPHENS

39, rue Gustave-Joncquet, à LILLE

Tout le confort

Petits déjeuners

HOTEL DU GLOBE

59 bis, Rue de Lanercy - PARIS (10^e)

entre la Gare de P&St et la Place de la République

Métro : Lanercy

Tél. Botzaris 42-37

Esperanto-Literaturo

je originala prezo

Liveras al vi :

ESPERANTO
BAUDIMONT-ARRAS